

Nal. poczt. opl. rycz.

DRUKARNIA *Kwadrat 1000 egz.*
BRATN. POM. MEDYKÓW U. J.
KRAKOWIE, GRZEGÓRZECKA 20.
TELEFON 162-58
fotograf

Duobla numero 50 gr.
Podw. numer

JUNA SAMIDEANO

MŁODY WSPÓŁIDEOWIEC

Monata. — Miesięcznik.

JARO I.
ROK I.

NOVEMBRO — DECEMBRO 1931.
LISTOPAD — GRUDZIEŃ

Nr. 4-5.

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: — REDAKCJA I ADMINISTRACJA:
KRAKÓW, PLAC MATEJKI 4.

ABONPREZO EKSTERLANDE: Jare 2. sv. fr. $\frac{1}{2}$ jare 1. sv. fr.		POŝTKONTO: — KONTO CZEKOWE: P. K. O. Kraków, Nr. 412.308.	ABONAMENT W POLSCE: Rocznie 2'50 zł. $\frac{1}{2}$ rocznie 1'30 zł.	
TARIFOJ POR ANONCOJ: $\frac{1}{1}$ 15 fr. sv. $\frac{1}{2}$ 10 fr. sv. $\frac{1}{4}$ 8 fr. sv. $\frac{1}{8}$ 5 fr. sv. $\frac{1}{16}$ 3 fr. sv.			CENY OGŁOSZEŃ: $\frac{1}{1}$ 25'50 zł. $\frac{1}{2}$ 17 zł. $\frac{1}{4}$ 13'50 zł. $\frac{1}{8}$ 8'50 zł. $\frac{1}{16}$ 5'10 zł.	

Paco.


La 15-an de Decembro, de nuna jaro, pasas jam 72 jaroj de la tempo, kiam Polujo donis al la mondo homon, kiu jam en plej junaj jaroj de sia vivo fariĝis apostolo de paco inter popoloj.

Ludviko Zamenhof naskiĝis en la tempo, kiam Polujo estis disŝirita kaj malliberigita. Vidante malamon inter la homoj ĝemantaj en mallibero kaj tiuj-kiuj ilin premis, vidante malpacon inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn, Zamenhof komencis revii pri forigo de la malfeliĉo.

Veninte al la konvinko, ke unu sola vojo al proksimiĝo de la popoloj estas ilia reciproka interkompreno la juna idealisto verkis komunan neŭtralan lingvon, inspiris en ĝin subliman ideon de la frateco kaj konkordo — kaj kreis aron da pioniroj, kiuj sub verda signo de la espero pri pli bona — pli luma estonteco kuraĝe ekbatalis por fratiĝo de la malpaciĝintaj popoloj — ekbatalis pri paco.

La Majstro ne ĝis-vivis la momenton en kiu post teruraj sangoferoj de la lasta milito, lia Patrujo elŝiriĝis el mallibero kaj reakiris sendependecon. Se li povus vidi sian Patrujon libera li certe ĝojegus: kiel granda tamen estus lia malĝojo, se li ekvidus, ke en la tuta mondo ekzistas homoj, kiuj ankoraŭ ne forgesinte pri pasintaj teruraj bataloj, volas elvoki novajn kruelajojn?

Libereco kaj sendependeco de nacioj estas tre grava faktoro por sana progreso. Sed tio ne sufiĉas, estas ankoraŭ aliaj faktoroj — kaj plej grava el ili estas paco. Nur en pacoj cirkonstancoj povas nacioj sperti benon de bonfarto kaj progreso.



Pokój.

Dnia 15-go grudnia bieżącego roku mija już siedemdziesiąty drugi rok od czasu, kiedy Polska dała światu człowieka, który już w zaraniu swego życia stał się apostołem poważnych ludów.

Ludwik Zamenhof urodził się w czasie, kiedy Polska była rozdarta i ujarzmiona. Widząc nienawiść pomiędzy jęczącymi w niewoli a tymi, którzy ich uciskali, widząc niezgodę między ludźmi mówiącymi odmiennymi językami, Zamenhof rozpoczął marzyć o usunięciu nieszczęścia.

Przyszedłszy do przekonania, że jedną jedyną drogą do zbliżenia się narodów jest ich wzajemne zrozumienie się, młody idealista stworzył wspólny neutralny język, tchnął wien wzniosłą ideę braterstwa i zgody — i stworzył gromadkę szermierzy, którzy pod zielonym znakiem nadziei o lepszej, jasnej przyszłości, z odwagą podjęli walkę o zbratanie poważnych ludów — podjęli walkę o pokój.

Mistrz nie dożył chwili, w której po strasznych i krwawych ofiarach ostatniej wojny światowej jego Ojczyzna wydarła się z niewoli i odzyskała niepodległość. Gdyby mógł widzieć Ojczyznę swoją wolną, radowałby się zapewne: jak wielkim byłby jego smutek, gdyby zobaczył, że w całym świecie są ludzie, którzy jeszcze nie zapomniawszy o niedawno minionych strasznych walkach, chcą wywołać nowe rozlewy krwi.

Wolność i niepodległość narodów są ważnymi czynnikami dla zdrowego postępu. Lecz to nie wystarcza, jest jeszcze wiele innych czynników, a najważniejszym z pośród nich jest trwały pokój. Tylko w pokojowych stosunkach narody mogą zaznać błogosławieństwa, dobrobytu i postępu.

Sed, bedaŭrinden kion ni vidas ĉiam kaj ĉie?

Ĉiama batalo de homo kontraŭ krudaj naturfortoj, ĉiama esplorado de misteroj de l'vivo, ĉiama laboro de la homo menso — ĉiutage alportas novajn eltrovojn, mirindajn elpensajojn, kiuj donas grandajn kaj valorajn servojn al multaj homoj.

Jes, tiuj eltrovoj estas tiel grandiozaj, ke ili povus grand-skale helpi la tutan homaron.

Novtempaj komunikiloj, aeroplanoj, aŭtomobiloj, telefonoj, radiotelegrafoj k. t. p., ĉiam pli malgrandigas interspacon dividantan landojn kaj urbojn. Rapidaj vagonaroj alportas el diversaj landoj ĉiusecajn produktojn al internaciaj foiroj kie ni povas konstati kiel multaj estas en mondo bonaj kaj utilaj ajoj.

Vere — la mondo estas riĉa je bonaĵoj kaj eblecoj uzi ilin por la ĝojo de ĉiuj homoj, kaj tial ni povus esperi ke inter la homoj devus regi bonfarto, gajaj hejmoj, paco kaj feliĉo.

Sed kion ni vidas?

Anstataŭ uzi novajn akiraĵojn de la kulturo por sia bono kaj utilo — la homoj elstreĉas ĉiujn siajn fortojn kaj kapablojn por elpensi kiel ĉiu nova eltrovo povus esti aplikata, kiel nova militilo, kiel oni povus turni ĉion bonan kaj utilan je malutilo kaj pere de la proksimulo, ŝanĝi je ilo de murdo.

Krom homoj kun malbona volo, vivas tamen aliaj kiuj laboras silente, sed konstante — ili laboras por doni al la homaro interkomprenon, amon kaj konkordon.

Tiuj homoj. estas ni, batalantoj el sub verda standardo. Nia aro ĉiutage kreskas — nia ideo akiras ĉiam pli multe da adeptoj.

Ni laboru plue kaj eble jam baldaŭ ni ekvidos ĉiujn militojn, kiel senbezona forĵetajo — kaj en la mondo ekregos amo kaj eterna paco.

J. S.

Lecz niestety cóż widzimy wszędzie i zawsze?

Wieczna walka człowieka przeciw żywiołom, wieczne badanie tajemnic życia, wieczna praca ludzkiego umysłu — codzień przynosi nowe podziwu godne wynalazki, które niezmiernie usługi oddają wielu ludziom.

Tak, wynalazki te są tak wspaniałe, że mogłyby w wielkiej mierze pomóc całej ludzkości.

Nowoczesne środki lokomocji, aeroplany, automobile, telefony, radiotelegrafia i t. p., coraz to bardziej zmniejszają przestrzeń dzielącą kraje i miasta. Pośpieszne pociągi zwożą z odległych krain wszelkiego rodzaju produkty na targi międzynarodowe, gdzie możemy z łatwością skonstatować, jak wiele na świecie jest rzeczy dobrych i użytecznych.

Zaprawdę — świat bogatym jest w dobra i w możliwości używania ich dla radości wszystkich ludzi i moglibyśmy się spodziewać, że między ludźmi powinien panować dobrobyt, wesołe ogniska rodzinne, pokój i szczęście.

Lecz cóż widzimy?

Zamiast używać nowych zdobyczy kultury dla swojego dobra i pożytku — ludzie wyężdżają wszystkie swoje siły i zdolności, aby wymyśleć jak każdy nowy wynalazek mógłby być użytym jako środek wojenny, jak możnaby wszystko co dobre i użyteczne, obrócić na szkodę i zagładę bliźniego, zmienić na narzędzie mord.

Poza ludźmi złej woli, żyją jednak inni, którzy pracują cicho lecz stale — pracują, aby dać ludziom zrozumienie, miłość i zgodę.

Ludźmi tymi są rycerze z pod zielonego sztandaru. Jesteśmy nimi my esperantyści. Szeregi nasze z dnia na dzień rosną a nasza idea zyskuje coraz więcej zwolenników.

Pracujmy dalej usilnie, a może już wkrótce ujrzymy wszelkie środki wojenne jako rzeczy bezużyteczne, w świecie zapanauje miłość i wieczny pokój.

Miraklo.

Al Geniulo, kiu en amado al la sublima ideo donis al homoj eblecon interkompreniĝi per unu lingvo.

Ne sonis sepfoje trumpetmelodi' —
Ne tuŝis la pacon pafileg' muĝanta. —
Li — mem — ĉe dika staris mur'. — Ni
Izolitaj vidis laboron kundian. Sufokanta
Vortojn mur' — en amo barilaj'
Antaŭ grandega kor' fariĝis ruinaj'.

Kaj tiam — Li per hela am'-rubando,
Liganta teron kun ĉiel', ĉiujn nin ĉirkaŭzonis, —
Kunforĝis korojn per ide', kvazaŭ per ora rando.
Ekstis la frateca sent' — komuna lingvo sonis. —
Plenumis sin mirakl'. — Popoloj do kuniĝu!...
Konkordo estu ĉie! — Se ne — batalo iĝu!

Cud.

Geniuszowi — co w umiłowaniu wielkiej idei dał ludziom możliwość zrozumienia się w jednej mowie.

Nie rozdźwięczyły się siedmiokroć surmy —
Słodkiego pokoju huk armat nie wzruszył.
On — sam — przed grubym murem stał. — My
Oddzieleni zbożną widzieliśmy pracę. — Mur co głużył
Słowa — niezrozumieniem — przeszkod, w braterstwie był,
Przed Jego sercem wielkiem rozpadł się w gruzy, w pył.

A wtedy — On miłości jasną tęczą,
Co z niebem łączy ziemi krąg, związał nas z całym światem
I serca jednym ideałem skuł — jak złotą obręczą,
I w jednej mowie mówił człek, że jest każdemu bratem.
Wyśniony stał się cud. Ludy ludom podały dłoń!...
Wolność i Równość! — rzekły, a nie — Pochwyćmy broń!

Zuzanna Ćwiklińska.

Per Esperanto al Pollando.

Lastan Julion, mi kaj ĉirkaŭ kva dek aliaj angloj veturis al la Kongreso en Krakovo en speciale aranĝita „karavano“. Ni iris fervoje de Londono al la angla haveno Harwich; de tie nokte al haveno en Nederlando; kaj de ĉi tiu, fervoje al Krakovo tra Nederlando kaj Germanujo. Unu sama vagono nin portis de la nederlanda haveno ĝis Krakovo, kaj ni estis tre komfortaj, malgraŭ iom sendorma nokto sur la ŝipo kaj dua nokto de la trajno mem. Kiam ni alvenis la Kongresurbon, frumatene la 1-an de Aŭgusto, jam estis ĉe la stacidomo aro da samideanoj por nin akcepti kaj bonvenigi kaj per ilia helpo ni facile enhejmiĝis en la al ni malproksima kaj fremda urbo. Preskaŭ tuj do, la urbo ne plu estis „fremda“, sed tute amika kaj hejmeca!

Kion mi diru pri la Kongreso mem: tiu festo en kiu ni estis meze de samideanoj el multaj landoj, libere parolantaj kaj amikiĝantaj kun ili, kaj precipe kun karaj polaj Esperantistoj, kiuj tiel afable kaj entuziasme bonvenigis nin kaj montris al ni la belajn kaj interesajn de la antikva kaj glora urbo Krakovo? Poste, kelkaj el ni iris al la moderna ĉefurbo Warszawa, kie denove ni spertis amikecon kaj gastamecon de lokaj samideanoj kaj povis admiri kaj esplori la belan urbejon sub ilia gvidado. Poste ni iris diversloken; kelkaj al Bjalistoko, la naskurbo de nia glora Majstro Zamenhof, por inaŭ-

guro de lia monumento; aliaj al siaj hejmlandoj; kaj mi mem, almenaŭ, al aliaj lokoj en Pollando, antaŭ ol veturi al mia patrujo kun multegaj belaj rememoroj pri plezuriga kajn eforge-sebla libertempo.

Multon mi ŝatis kaj admiris en Pollando, kaj ĉie mi spertis ĉe la loĝantoj plej koran afablecon kaj ĝentilecon. Mi ankaŭ tre ŝatis la diversigitan polan kamparon: ĉu mi diru, egale ĉarma kaj bela kiel tiu de mia hejmlando? Nu, almenaŭ mi diru ke la unu sufiĉe similas la alian kaj ke mi tute ne sentis min „fremde“ en la polaj kampoj kaj vojoj! Kaj pri la helpemo de la polaj civitanoj — ĝi sekvis min eĉ ĝis mia lasta nokto en la lando, kiam en landlima urbeto afable policano trovis por mi hotelon kaj ŝparis al mi multe da ĝeno. Do, ĉu mi ne pravus, dirante, ke se Esperanto kondukis min al Pollando, ĝi ankaŭ ebligis al mi viziti landon de abunda ĉarmo kaj al'ogo, kaj tion fari sen ia malfacilo aŭ kaŭzo por malkontenteco.

Esperanton mi parolis kun poloj de la plej diversaj okupoj kaj interesoj — de profesoroj ĝis tramistoj. Ĉu oni ne pravus, dirante ke tiu utilega lingvo taŭgas por ĉiu kaj ĉio kiel internacia komprenilo kaj amikigilo?

BERNARD LONG (London).

Nia nova ejo.

Ni sciigas al ĉiuj niaj legantoj, ke ni ŝanĝis nian adreson kaj ni tre petas, ke ĉiuj bonvolu direkti artikolojn kaj korespondajn laŭ la nova adreso: „Eldonejo JUNA SAMIDEANO“ Kraków, Plac Matejki Nr. 4.

Malgraŭ tre malfacilaj cirkonstancoj kaj ĝenerale reganta krizo, ni translokis niajn redakcion kaj administracion en la pli grandan kaj pli belan ejon.

Ni disponas nun oportunan oficejon kaj belan ĉambregon por prelegoj, kiu povas ampleksi pli ol cent aŭskultantojn.

Volante pligrandigi la nombron de niaj abonantoj kaj kunlaborantoj, ni gvidas en nia nova ejo Esperanto-kursojn por junularo kaj por diversspecaj fakistoj.

La kursoj okazas depost la 1-a de novembro 1931 kaj gvidataj estas kursoj por: tramvojistoj — 40 partoprenantoj,

presistoj — 35 partoprenantoj, junularo — 31 partoprenantoj. Entute do, ni posedas 106 esp. gekursanojn.

En la plej proksima tempo estos organizata esp.-kurso por skoltaro.

Volante doni al novaj samideanoj eblecon kunvivi kaj ekzerci nian lingvon, ni aranĝas ĉiu-dimanĉe societajn vesperojn, dum kiuj niaj gekursanoj kaj simpatiantoj bonege amuziĝas, babilante kaj dancante ĉe bonega orkestro.

Depost januaro 1932 ni malfermas ĉe nia eldonejo legejon de ĉiuj e perantaj jurnalaj kaj prunedonejaj de esperantaj libroj.

Nia laboro donas bonajn fruktojn kaj ni esperas, ke ĝi ampleksos vastajn rondojn.

Ni do petas niajn kunlaborantojn kaj apogantojn, ke ili ĉiam estu tiel fervoraj — kiel ĝis nun.

Nia enketo.

En la dua N-ro de „J. S.“ ni lokis enketon je la temo: „Kion mi voŭs trovi en esperanta gazeto“. La enketo donis al ni rezulte multajn valorajn konsilojn kaj sufiĉe riĉan materialon.

Ni ricevis 115 respondojn laŭ kiuj ni aranĝas la enhavon de nia gazeto. Ni do enkondukos la sekvantajn fakojn: feljetono, tradukoj el pola literaturo, fako turista kaj landokona, esperanta movado, fako skolta, sciindaĵoj, kaj fako koresponda.

Irate laŭ konsiloj de la plej multo de niaj samideanoj ni decidis forigi depost nova jaropol an tekston. Ĉar fakon lingvokonan tuŝis neniu el la ricevitaj respondoj, sekve tiu fako ne estos en J. S. lokata.

Ni tre dankas al ĉiuj, kiuj bonvolis interesiĝi pri la enketo kaj ni penas gvidi la menciitajn fakojn laŭ la ŝatindaj konsiloj kiujn ni ricevis. Nian premion por la plej bona respondo ricevis S-ro Jan Kopeć, Lwów.

De Redakcio.

C. Dyja (Chorzów). Pro granda materialo, viaj artikoloj aperos en unu el plej proksimaj numeroj de J. S.

Miklaszewski (Lublin). Via Fantomo aperos en januara numero de J. S. la dua artikolo jam ne estas aktuala.

M. Weralski (Jabłonna). Ni tre ĝojas, ke vi volas helpi al ni kaj samtempe vi sendis enigm-vizitkartojn, por kio ni tre dankas Vin.

Ni sciigas ĉiujn niajn legantojn, ke ni enpresas en rubriko „Korespondado“ adresojn de tiuj personoj, kiuj pagis koziton por abono de J. S., aliaj samideanoj devas pagi po vorto 10 gr.

Plej oportuna pagmaniero estas per la poŝkonto; P. K. O. Kraków, Nr. 412308, aŭ respondkuponoj.

Memoru ke jam estas tempo por reaboni por nova duon-jaro.

Por respondo bonvolu ĉiam aligi poŝtmarkojn, alie Redakcio ne povas respondi.

Abonkotizon por Juna Samideano bonvolu sendi plej oportune pere de nia poŝtkonto. P. K. O. 412.308, eksterlandanoj per poŝtmandatoj, aŭ en registritaj leteroj.

24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo.

30 julio - 6 aŭgusto 1932.

Invito. — La oficiala invitanto de la Kongreso estas Komerca Ĉambro de Parizo

Loka Kongresa Komitato. — Prezidanto: Georges Warnier; vic-prezidanto: intendanto — generalo Lucien Bastien; Kasisto: Lucien Tulen; ĝenerala sekretario; L. N. Nevel.

Kongresa oficejo. — La Maison de France, 101, avenue des Champs-Élysées, Paris-VIII.

Banko. — La Société Générale, Paris.

Kotizoj. — Oni aŭkcios kongreskarton n-ro 1; ĝis nun la plej alta propono estas 2000 francaj frankoj.

Kongreskartoj 2 ĝis 11 estas rezervitaj por la membroj de la familio de Zamenhof.

Kongreskartoj 12 ĝis 100 kostos po 1000 francaj frankoj.

Kongreskartoj de 101 ĝis fino kostos po 125 francaj frankoj.

Junulaj membroj. — Gejunuloj, kiuj havos ne pli ol 17 jarojn je la 1 aŭgusto 1932, povos ricevi junulan kongreskarton, po 30 francaj frankoj. Ili rajtos ricevi senpage la kongresan gazeton, sed ne la aliajn kongresajn dokumentojn.

Plialtigo de kotizoj. — Post la 1 julio 1932 oni altigos la ordinaran kotizon po 75 frankoj; do post tiu dato, la kotizo estos 200 frankoj. Krome, post tiu dato, la kotizo por junulaj membroj estos 60 frankoj.

Donacoj. — La LKK tre danke akceptos donacojn por helpi en la grandaj elspezoj de la Kongreso.

Garantia kaso: La LKK starigis garantian kason por saldi eventualan deficiton de la kongreso. La minimuma garantio por ĉiu subskribanto estas 500 francaj frankoj. Ĝis nun tiu kaso sumas je 120.000 frankoj.

Fervojaj rabatoj: La LKK klopodos por ricevi specialajn rabatojn por kongresanoj sur francaj kaj alilandaj fervojoj, kaj esperas fari anoncon pri tio post nelonge.

Vizoj: La LKK klopodos por havigi al kongresanoj laŭeble senpagan vizon por eniro en Francujon.

Kongresa gazeto: La LKK eldonos, komence de Januaro 1932, specialan „Kongresan Gazeton“, kiu estos sendata al la kongresanoj senpage. La ĉefredaktoro estos la fama aŭtoro, Raymond Schwartz, kies nomo garantias utilan, vigan kaj spritan gazeton. Oni sendos la jam aperintajn numerojn al ĉiu kongresano ĝis elĉerpiĝo de la ekzempleroj. Sekve, ni konsilas al tiuj, kiuj deziras havi kompletan kolekton de ĉi tiu unikaĵo, ke ili aliĝu al la kongreso tuj.

Karavanoj: En diversaj landoj oni organizos karavanojn al la kongreso. La organizantoj estas petataj interrilati kun la ĝenerala sekretario kiel eble plej frue, por eviti duoblan laboron. La LKK faros anoncojn en siaj bultenoj kaj en la Kongresa Gazeto de tempo al tempo pri projektataj karavanoj

Ĉu junularo sufiĉe laboras por disvastigo de Esperanto?

Esperanta literaturo estas plej bona rimedo por diskonigi nian lingvon kaj konvinki niajn malamikojn, ke Esperanto absolute estas mondhelplingvo.

Ni havas bonegan kaj tre riĉan literaturon sed bedaŭrinde ĝi ne tute plenumas sian taskon kiel propagandilo. Kial? — ni legu kion skribas eminenta esperantisto S-ro Knut Jensie pri disvastigado de Esperanto, en sia artikolo lokita en „Heroldo de Esperanto“.

„Disvastigado de Esperanto“ dependas de samideanaro juna. Kion faras ili por disvastigado de Esperanto? Preskaŭ nenion! La junaj homoj en nuna tempo estas tro oportunaj, tro profitemaj, tro maldiligentaj por serioza laborado. Ili ne havas sufiĉe da volo por la batalado. Ne, ili havas aliajn interesojn egoistajn. Ili faras, kiel la cikado en la rakonteto de Vilho Setälä: „Nur dancas kaj ludas, ludas kaj dancas“; kaj kiam la aŭtuno de l' vivo venos, ili ne havos altajn idealojn. Lernado kaj disvastigado de Esperanto nur flanke okupas ilin dum kelkaj horoj ĉiumonate. Diru al juna komencanto aŭ progresanto: „Bonvolu, aĉetu facilajn lernolibrojn aŭ utilajn, interesajn librojn por progresado, kaj samtempe kreskos nia internacia literaturo kaj pro tio evoluos nia lingvo“; multaj el ili tiam respondos, balbutante kaj kapskuante: „Ni ne havas tempon por legi aŭ lerni, baldaŭ estos somero, tiam mi ne volos studi. La vetero estos tro bela por studado. Atendu

ĝis la aŭtuno, tiam mi eble aĉetu: *la plej malgrandan libreton* kiun vi havas...“.

Sed tamen okazas, ke la samaj personoj frivole malŝparas monon por pridubeblaj plezuroj, kiuj plene ruinigas iliajn ekonomiajn statojn, kaj tute detruas ilian sanon... Jes! Sed ili ne havas tempon. Ili ne havas monon por Esperanto. — Bedaŭrinde.

La sama afero estas, se vi petas ilin aboni gazetojn Esperantajn. Ili kapskuas, balbutas kaj batas per siaj manoj kaj deklaras, kiel malriĉaj kaj okupitaj ili estas. Ili ne havas tempon — por Esperanto. Jes! Ekzistas tiaj homoj, kiuj ne volas fari la plej malgrandan ekonomian oferon por la afero. Tio estas bedaŭrinda afero.

Vere, la plena disvastigado de Esperanto certe estas dependa de l'esperantistoj mem, ne de aliaj homoj. Pensu, se ĉiu persono, kiu sin volas nomi *esperantisto*, nur volus aboni unu internacian kaj unu nacian gazetojn, kaj aĉetus nur unu libron ĉiumonate! Ho jes, certe tiamaniere oni havus tre bonan sukceson, kaj nia lingvo disvastiĝus tre rapide, kaj tra la tuta terglobo, tra ĉiu vilaĝo en la tuta mondo marŝus heroldo Esperanta — kaj preskaŭ ĉiu homo estus amanto de nia kara sankta afero kaj ano de nia movado. Nur tio — kaj Esperanto venkus!

XV-a datreveno de morto de Henryk Sienkiewicz.

La 16-an de novembro estis 15-a memortago de morto de unu el plej eminentaj polaj verkistoj Henryk Sienkiewicz. Sienkiewicz naskiĝis en Wola Okrzejska — Podlasie, la 4-an de majo 1846. Jam en printempo de sia vivo, estante studento ĉe Universitato Varsovia, kiu nomiĝis tiam „Centra Lernejo“, Sienkiewicz provis siajn fortojn en verkado, kreante bildojn, skizojn, kaj samtempe skribante al ĵurnaloj multajn artikolojn.

Post pola naci-leviĝo en la jaro 1863, ekregis en Polujo senreviĝo kaj da laboro estis tre multe: estis necese levi la landon el ruino, pensi pri klerigo de juna generacio, okupiĝi pri vilaĝa popolo, estis bezone krei polan industrion. Sienkiewicz kune kun Prus kaj aliaj junuloj disvolvis tre vivan agadon, ĝuste per helpo de artikoloj. „Ni instigis homojn — li skribis poste — al fondado de fajra gardservo, infanaj ĝardenetoj kaj lernejoj, kompanioj bankoj... Ni lasis nenion

trankvila". Liaj unuaj verkoj estis „Maljuna servisto" kaj poste „Hania" (1876), kaj baldaŭ Polujo ekvidis, ke en juna verkisto troviĝas animo de granda artisto — poeto. Kun firma jam famo, ekvojaĝis Sienkiewicz en la jaro 1876 al Ameriko kaj frukto de lia vojaĝo estas belegaj „Leteroj". Reveninte el la vojaĝo li komencis verki multajn novelojn kaj romanojn. Plej grandan famon li akiris per siaj verkoj historiaj kaj multaj el ili estas tradukitaj preskaŭ je ĉiuj lingvoj eŭropaj. Kaj plej konata inter ili estas „Quo-Vadis"

Nerona Torĉaro.

El „Quo Vadis" de Henryk Sienkiewicz.

Krepusko ankoraŭ ne falis, kiam unuaj ondoj de popolo komencis enflui en la ĝardenon de la cezaro. Popolamasoj feste vestitaj, florkronitaj, viglaj kaj kantantaj, kaj parte ebriaj, iris rigardi je nova, grandioza vidaĵo. Post traire de la ĝardenaj pordegoj amasoj mutiĝis pro miro. Ĉe ĉiuj aleoj ĉefaj kaj flankaj estis vicoj da peĉaj palisoj, al kiuj estis alligitaj kristanoj. Oni povis ekpensi, ke ian tutan nacion oni alligis al la palisoj por ĝojo de Romo kaj cezaro Nerono. Aroj da rigardantoj haltiĝadis antaŭ unuopaj mastoj, depende de tio — kiel interesigis ilin staturoj, aĝo aŭ sekso de oferoj, ili pririgardis vizaĝojn, kronojn, girlandojn el hedero, post kio oni iradis pluen kaj pluen, demandante sin kun mirego: Ĉu povis esti tiom da kulpuloj? Aŭ: „Kiel povis bruligi Romon infanoj, apenaŭ scipovantaj iradi per propraj fortoj? Kaj mirego iom post iom ŝanĝadis sin je maltrankvileco.

Du ne fals krepusko kaj sur ĉielo eklumis unuaj steloj. Tiam ĉe ĉiu kondamnito ekstaris sklavo kun brulanta torĉo en mano, kaj kiam sono de trumpetoj aŭdiĝis en diversaj partoj de la ĝardeno je signo de la komenco de spektaklo, ĉiuj sklavoj almetis fajron al malsupro de la palisoj.

Kaŝita sub floroj ĉirkaŭantaj palisojn, traigita per peĉo pajlo baldaŭ ekbrulis per helaj flamoj, kiuj leviĝis supren kaj ĉirkaŭis piedojn de la oferoj. Popolo silentiĝis. Ĝardenoj eksonis per unu grandega ĝemo kaj krioj de l' doloro. Kelkaj oferoj tamen, levante kapojn al stelplena ĉielo, komencis kanti je honoro de Kristo. Popolo aŭskultis. Sed plej malmolaj koroj pleniĝis per teruro, kiam el malpli grandaj mastoj disŝirantaj voĉoj infanaj komencis krii: „Panjo! panjo!" — kaj tremo trakuris eĉ ebriajn rigardantojn je vido de tiuj kapetoj kaj senkulpaj vizaĝoj, kuntiritaj pro doloro aŭ svenantaj en la fumo, kiu komencis sufoki oferojn. Kaj flamo iris supren kaj trabruldadis ĉiam novajn kronojn el rozoj kaj hedero. Odoro de brulitaj korpaj plenigis ĝardenojn, sed en tiu momento sklavoj komencis ŝuti en speciale preparitajn inter palisoj oferfumojn mi-hon kaj aloon. Inter amasoj aŭdiĝis ekkrioj, nesciate ĉu pro kompato, ĉu pro ebrio kaj ĝojo kaj pligrandiĝis kune kun fajroj kiu ĉirkaŭadis palisojn, grimpis al brustoj de oferoj, kunvolvadis per ardanta spiro harojn sur iliaj kapoj, ĵetadis kurtenon sur nigriĝintajn vizaĝojn kaj fine ŝvebis ankoraŭ pli alten, kvazaŭ je venko kaj triumfo por tiu ĉi forto, kiu ordonis ĝin igi.

Sed ankoraŭ en komenco de spektaklo aperis inter popolo Nero en grandioza cirka veturilo, jungita je kvar blankaj ĉevaloj. Post li sekvis aliaj veturiloj, plenaj je korteganoj riĉe vestitaj senatoroj kaj pastroj kun florkronoj sur kapoj kruĉoj da vino en manoj, parte ebriaj kaj eldonantaj sovaĝan kriojn. Apud ili muzikistoj ludis je citroj kaj fajfiloj. Ĉe veturiloj saltistoj skuetadis ornamitajn per rubandoj tirsajn, aliaj batis je tamburoj, ankoraŭ aliaj ŝutis florojn. La tuta grandioza sekvantaro antaŭeniris tra plej vasta ĝardeno vojo, kriegante: „Evoe!" Nero sola gvidis ĉevalojn kaj, veturante malrapide, rigardis sur brulantajn korpajn, kaj samtempe aŭskultis ekkriojn de popolo.

De tempo al tempo Nero haltiĝadis, por pririgardi pli detale ian virginon, kies korpo komencis knari en flamoj, aŭ ian konvulsie kuntiritan vizaĝon de infano, kaj ree veturis

pluen, tirante post si frenezajn kaj ebriegan sekvantaron. Fine alveturinte al granda akvoŝprucejo, staranta meze de kruciĝantaj vojoj, desaltis el veturilo kaj alvokinte akompanojn per svingo de mano, enmiksiĝis en la popolamasojn.

Oni salutis lin per krio kaj aplaŭdo, oni cirkaŭigis lin per svarmeganta rondo, kaj li havante ĉe unu flanko Tigellinon, ĉe alia Chilonon, ĉirkaŭiris akvoŝprucejon ĉirkaŭ kiu brulis dekelkaj torĉoj, haltiĝante ĉe ĉiu, farante diversajn atentigojn pri oferoj, aŭ mokante pri maljuna Greko, sur kies vizaĝo estis videbla senfunda malespero.

Fine ili ekstaris antaŭ alta masto ornamita per mirtoj kaj ĉirkaŭvolvita per hedero. Ruĝaj langoj de fajro ĝisiris jam ĝis genuoj de la ofero, sed vizaĝon lian oni ne povis komence rekonii, ĉar freŝaj brulantajn branĉetoj kovris ĝin per fumo. Post momento tamen facila nokta vento disblovis fumojn kaj malkovris kapon de maljunulo kun blanka falanta sur busto barbo.

Je tiu vido Chilon kunvolviĝis kvazaŭ vundita amfibio, el lia buŝo elŝiriĝis krio pli simila al bleko, ol al homa voĉo:

— Glaŭkos! Glaŭkos!

El brulanta paliso rigardis lin vere kuracisto Glaŭkos.

Glaŭkos ankoraŭ vivis vizaĝon havis dolorplenan mallevitajn kvazaŭ li volus lastfoje ekrigardi je sia turmentanto, kiu lin perfidis senigis lin de edzino kaj infanoj, sendis al li murdiston, kaj kiam ĉio estis al li pardonita je nomo de Kristo, ankoraŭ foje eldonis lin en manojn de venĝantoj. Nenian faris homo al homo pli terurajn kaj pli sangajn maljustaĵojn kaj jen ofero brulis nun sur peĉa paliso, kaj turmentanto staris sub liaj piedoj. Okuloj de Glaŭkos ne deturmis sin de la vizaĝo de Greko. De tempo al tempo kovris ilin fumo, sed kiam ekblovis venteto, Chilon ree vidis tiujn fiksitaĵojn en lin pupilojn. Li leviĝis kaj volis forkuri, sed li ne povis. Subite ŝajnis al li, ke liaj piedoj estas el plumbo kaj ke ia nevidebla mano haltigas lin kun superhoma forto. Kaj li ŝtoniĝis, Li sentis nur, ke io pleniĝas en li. io forŝiras sin, kiel havas jam sufiĉe de turmentoj kaj sango, ke alvenas fino de la vivo kaj ke ĉio ĉirkaŭe malaperas: cezaro, kaj kortegano, popolamasoj kaj ĉirkaŭas lin nur ia senfunda, terura kaj nigra malplenejo, en kiu estas videblaj okuloj de turmentato kiuj vokas lin al juĝo. Kaj la alia, mallevente kapon ĉiam pli malalten, rigardis konstante. La ĉeestantoj divenis, ke inter tiuj du homoj io okazas, sed rideto mortis sur iliaj buŝoj, ĉar en vizaĝo de Chilon estis io terura: kuntiris ĝin tia doloro, kvazaŭ tiuj flam-langoj bruligis lian prapan korpon. Subite li ŝanceliĝis kaj etendinte supre la brakojn, ekvokis per terura, mallepera voĉo:

— Glaŭkos! je nomo de Kristo! pardonu!!!

Silentiĝis ĉirkaŭe; tremo trakuris ĉeestantojn, kaj ĉiuj okuloj malgraŭvole leviĝis supren.

Kaj kapo de turmentato leviĝis iom, post kio oni ekaŭdis el supro de masto voĉon similan al ĝemo:

— Mi pardonas!...

Chilo falis je vizaĝo, hurlante kiel sovaĝa besto, kaj preninte teron en ambaŭ manojn, li surŝutis per ĝi sian kapon. Dume la flamoj leviĝis supren, ĉirkaŭis bruston kaj vizaĝon de Glaŭkos, disvolvis mirtan kronon sur lia kapo kaj ekposedis rubandojn sur supro de la paliso, kiu eklumis tuta per blindiga brilo.

Sed Chilo leviĝinte post momento kun tiel ŝanĝita vizaĝo, ke al aŭgustianoj ŝajnis, ke ili vidas alian homon. Okuloj liaj flamis per nekutima brilo, el kunfaldita frunto estis videbla entuziasmo! Sentaŭga ĝis nun Greko aspektis kvazaŭ pastro, kiu inspirita de dio, valos malkovri nekonatajn verojn.

Kio okazas al li? li frezeziĝis! — aŭdiĝis kelkaj voĉoj.

Kaj li turnis sin al popolamasoj kaj etendinte supren dekstran manon, komencis krii, aŭ plivere kriegi tiel laŭte, ke ne nur aŭgustianoj, sed ankaŭ amaso povu lin aŭdi:

— Roma popolo! je mia morto mi ĵuras, ke jen pereas senkulpaj, kaj bruliganto estas — tiu!...

Kaj montris per fingro Neronon.

Tradukis: Patro.

TRA ESPERANTUJO.

Esperanto en radio.

Organizita de la Inter. Radio Komisiono kaj komisiita al la Centra Komitato de la Esperanto-Movado Esp. Radio-Servo, laboras fervore por enkonduki esperanto paroladojn en ĉiuj radio-stacioj de la mondo.

La plej grava tasko de I. R. S. unuavice estas subteni la radio parolantojn kaj prepari la kampon ĉe la sendstacioj kaj radio-societoj. Esperantaj disaŭdigoj en radio plej bone konvinkas la kontraŭulojn, ke Esperanto efektive vivas kaj estas uzata ĉie en la mondo, ke ĝi estas ĉie komprenata kaj servas al praktikaj celoj. En la jaro 1930 okazis laŭ statistiko 1909 radio-disaŭdigoj de Esp.-paroladoj kaj kursoj de Esperanto. I. R. S. entreprenis specialajn aranĝojn kiuj celas enkonduki esperantajn radio-paroladojn, se eble ĉiu-semajne kaj en ĉiuj radio-stacioj. Depost kvar jaroj aperas esperanto-gazeto, sub titolo Internacia Radio Servo donanta ĉiumonate programon de esperanto-disaŭdigoj preskaŭ de ĉiuj radio-stacioj en la mondo. En la lasta jaro Esperanto sur kampo de la radio faris grandegajn progresojn kaj unu plej grava kiun ni laste eksciis estas sukceso ĉe japana radio-stacio en Osaka. De la dekdna de julio 1931 ĝis la 31-a de aŭgusto 1931-a okazis en menciita radiostacio disaŭdigo de esperanto-kurso gvidita de s-ro Sindo-Seitaro japana reprezentanto de K. R. La disaŭdigo ampleksis la okcidentan duonon de ĉefa japana insulo Poŝu. Pere de leteroj oni eksciis ke la kurson aŭskultis lernemuloj en Kiuŝu, en gubernioj Aiĉi, Sizuoka, Isikaŭa, Nagao kaj eĉ en Koreo. Dum daŭro de kurso oni eldonis 20. mil ekz. da lernolibroj kiuj ĝis fino de kurso estis tute elĉerpitaj. Post fino de kurso 625 personoj faris skriban ekzamenon kaj el nombro de ekzamenitoj 83% faris malpli ol po 5 eraroj en siaj taskoj.

Dekreto de la Greka Ministerio de Publika Instruado.

Konsiderante la gravecon kiun ĉiutage akiras Esperanto en la civilizita mondo, greka Ministerio de Publika Instruado eldonis la 7-an de novembro 1931, dekreton rekomendantan al la Ĝenerala Inspektoro de la Publikaj Lernejoj en Ateno, ke li permesu al la Greka Esperantista Akademio instrui Esperanton al la lernantoj de gimnazioj kaj instruistaj institutoj.

Esperantista Akademio por Helena Respubliko komencis realizi la dekretan en la lernejoj de Ateno kaj Pireo.

Liberaĵoj de Esperanto en Hispanujo.

Hispana Ministerio de Publika Instruado lokigis en sia budĝeto la sumon 50.000 pesetoj kiel subvencion por Hispana Esperanto Instituto, por fondi pagatajn liberaĵojn de Esperanto.

Hispana Esperanto-Instituto fondos oficiale liberaĵojn de Esperanto en Barcelona, Gerona, Palma de Mallorca, Zaragoza, Valencia, Cordoba, Sevilla, Madrid, Bilbao, Gion, Ferrol, Badajoz, kaj Orense.

Instruado en la katedroj komenciĝos de januaro 1932 kaj la unuaj kursoj finiĝos antaŭ Pariza Kongreso.

Ĉiu instruisto havas du altajn premiojn por la plej bonajn lernantojn, kiuj devos uzi la premiojn por partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo.

Mondvojaĝo por Esperanto.

Speciala delegito de Internacia Centra Komitato, multe konata usona ĵurnalisto, Joseph R. Scherer, korespondanto de multaj usonaj gazetoj inter aliaj de granda ĵurnalo »Los Angeles Times« fervora esperantisto, nuntempe ĉirkaŭvojaĝas tutan Eŭropon kun prelegoj pri usona filma industrio kaj propraj vojaĝoj

sur sudaj insuloj. Lia vojaĝo gvidas de Los Angeles (Kalifornio) tra Japanlando, Malajaj insuloj, Hindujo, Persujo k. t. p.

En Japanlando li prelegis ĉirkaŭ 50 fojojn en Esperanto-lingvo. Dank'al lingvo internacia »Esperanto« li povis precize esplori la japanan vivon internan kaj eksteran. Nune li estas en Hungarujo kun prelegoj kunligitaj kun lingvo internacia »Esperanto«. Pri lia vojaĝo aperis ĉirkaŭ 400 gazet-artikoloj.

Nova oficiala propagand-vojaĝo en Europo.

Internacia Centra Komitato aranĝas novan esperantan propagand-vojaĝon. Direktoro de Esperanto-Muzeo en Vien reg. konsil. H. Steiner, multe konata esperantisto kaj rutinulo en diversaj fakoj, entreprenas penan laboron por Esperanto. Lia vojaĝo komenciĝas jam en unuaj tagoj de januaro kaj gvidos de Vien (Aŭstrio) tra Polujo, Dancigo, Litovio, Latvio, Estonio, Finnlando, Svedujo, Norvegiujo, Danujo ktp. Dum sia vojaĝo li prelegos pri »Bela Aŭstrio« kun lumbildoj. Kiel bona konanto de organizacioj, li helpos per siaj konsiloj al esperantaj grupoj kaj rondoj. Do bonega propagando kaj okazo por montri ke Esperanto utilas. S-ro Steiner ekster la oficiala programo ligos kun sia vojaĝo propagandon por Esperanto-Muzeo en Vien kaj ĝiaj detaloj pri kiuj ni povos detale esti informitaj.

Enketo pri stenografio.

La stenograf-oficejo de la Hungara Parlamento, dissendis enketon en Esperanto-lingvo al ĉiuj delegitoj de U. E. A. kaj aliaj esperantistaj faktoroj por traduki ĝin en nacian lingvon kaj traduki ĝin al la oficejo de naciaj parlamentstenografoj la enketo enhavas demandojn pri organizo, salajro, laboro, sistemoj kaj aliaj diversaj rilataj parlamentajn stenograf-oficejojn.

La rezultajo de la enketo aperos en libroformo. La koston libro 1 sv. fr. interesuloj petu la enketon de stenograf-oficejo de la Hungara Parlamento, Budapest V. Parlamento.

Zamenhof-festoj en radio.

En nunjara vintro, same kiel en la lasta, radio-sendstacioj kaj radio-parolantoj denove aranĝas Zamenhof festojn, en radio al la naskiĝtago de nia Majstro, la 15-an de decembro.

Esperanta Domo en Arnhem.

Eble ne ĉiu samideano scias, ke estas nova Esperanta-Hejmo en Nederlando, kies direktoro estas Pastro Cseh, kiu tie gvidas konstante esperanto-kursojn por instruistaro.

Solena malfermo de Esperanto-Domo okazis la 11-an de aŭgusto 1931. La propra hejmo estas tre grava por disvolviĝo de Esperanto inter instruistaro.

La esperantistoj povas esti feliĉaj posedante nun veran Esperantan hejmon, kie troviĝas dormoĉambroj kun fluanta akvo ktp. La ĉambroj donas lokon al preskaŭ 100 personoj.

Esperantistoj kiuj volas ripoziŭ a trankvile labori, povas loĝi en la domo, kiu estas malfermita dum la tuta jaro. Ĉar la domo staras meze en vasta kaj trankvila parko, oni ĝuas perfektan ripozon.

Novaj Zamenhof-stratoj kaj placo de Esperanto.

Por honori la kreinton de internacia lingvo Esperanto, la urba konsilantaro de Brevnov (kvartalo Praha XVIII) rekomeno en sia komitata kunveno doni al ili strato la nomon de D-ro L. L. Zamenhof, kaj nomi iun placon Placo de Esperanto. Ankaŭ Barcelona urbestro kaj de Amiens (la nordfranca urbo) oni donis nomon de D-ro Zamenhof al novaj stratoj.

Skolta Angulo.

ESTU PRETA!



CZUWAJ!

Junaj fratoj.

Ni devas plej unue propagandi nian ideon ĉe movadoj, kiuj estas parencaj, do oni povas esperi pli multan komprenon kaj entuziasman sekvanton! Kiel lingvon, povas ĉiuj movadoj, fakoj, celadoj praktike uzi Esperanton, sed nun mi parolas pri idea parenceco, kiu staras pli proksime al la Zamenhofa spirito: prepari homaranan pensadon kaj vivon sur la tero. Oni diras kutime mallonge: la interna ideo! Tiu donis entuziasmon, paciencon, laboremon al niaj pioniroj! Tio estos nia celo tiam, kiam la praktika flanko, la disvastigo kaj uzado de la lingvo jam efektiviĝis.

Unu el tiuj movadoj estas la skolta. Ĝiaj principoj, dek leĝoj enhavas precizigite la internan ideon. Zamenhof volis per Esperanto, ke ĉiu homo estu frato, povu facile servi al la alia, estu preta al servado, estu fidela al siaj principoj, al patrujo, al la pli alta forto, ricevu pli larĝan mondkomprenon, pli vastan horizonton, studu, evoluu, konkuru, harmoniigu! Jen ĉio preskaŭ laŭvorte en-estas en la skoltismo! Nur kompreneble estas aldonata la korpa ekzercado, libera aero, saneco, vagado, vojaĝado.

„Ĉiuj skoltoj estas fratoj“ diras la skolta leĝo. Por efektiviĝi tiun kaj la aliajn ĉefajn principojn la skoltoj bezonas Esperanton kaj ne estas mirinde, ke ili jam fondis Skoltan Esperantistan Ligon, kiu per siaj tendaroj ĉiujare en alia lando pravas la realigon de la frateco kaj interkompreno. Nun ĝi okazis en Hungarlando, en venonta jaro — apud Londono. Sed la trupestro de la hungara elektita skolttaĉmento, kiu vizitis la grandan mondjamboreon (tendaron) en Britujo en 1929, spertis mem, ke la pli multo ne povis interkompreniĝi, malgraŭ antaŭa lernado, per la angla lingvo kaj li ankaŭ vizitis la tendareton de la Esperantista Ligo kaj trovis ĝin tre modela. Li do eĉ deziras proponi, ke por la venonta mondjamboreo havu avantaĝon tiu skolto por partopreni en la elektita taĉmento, kiu scias Esperanton. Jen perspektivoj! Tiun ĉi opinion kaj ĉi supran

inviton devus la esperantistoj (societoj kaj grupoj) konigi al la naciaj kaj lokaj skoltaj ligoj, trupoj, grupoj, proponante al ili instruadon de Esperanto kiu signifus ja ankaŭ por ili la ovon de Kolumbo, ĉar la skoltaj ligoj, trupoj kaj la skoltoj multe korespondas oficiale kaj private unu kun la alia. La naciaj skoltligoj sendu oficiale skoltojn al la tendaroj de SEL. (Skolta Esp. Ligo) kaj proponu reciproke la uzadon de Esperanto, precipe en la grandaj jamboreoj kaj dum vojaĝoj, gastigoj. Ĉar al la skoltaro apartenas plej multloke la elektita junularo, lernantoj de la landoj, per ili ni havus la estontan generacion por Esperanto! Ĉu vi volas kunlabori? Komencu jam nun!

S. F. (Budapest).

Sukcesa Skolta servado ĉe la postkongreso en Budapeŝto.

La membroj de la budapeŝta esperanta skolta rondo faris bonan laboron okaze de la postkongreso, kiun partoprenis 100 personoj el dek landoj. Ili atendis la krakovan karavanon ĉe la stacidomo kun flago, kantis ĉe alveno de la vagonaro la skoltmarŝon kaj post salutvortoj la hungaran himnon. Poste ili gvidis la gastojn al hotelo. Vespere ili prezentis kantan scenon en restoracio kaj la samon dimanĉe vespere sur la Margaretinsulo. Tion menciis ankaŭ la gazetoj. Lunde ili post montekskurso sur danuba ŝipo kantis kaj ili finis la festvesperon kun koncerto, montrante scenojn apud tendarfajro. Bedaŭrinde tiam kelkaj el ili havis scenejfebron. La partoprenantoj ofte esprimis la dankon al la skolta helpo, gvidado. Kelkaj skoltoj ĉiam kuniris kaj prizorgis diversajn servojn. La esperantistoj povis do sperti, kiel multe signifas la skolta laboro kaj la gvidantoj mem deklaris, ke la skolta helpo duobligis la sukceson. Ilia gvidanto, Andreo Szikszay meritas la ĉefan dankon, sed ankaŭ ĉiuj junuloj aparte pro la montrita granda fervoro kaj bonvolemo. Multaj gastoj promesis propagandi Esp. hejme inter skoltoj.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO.

Projekto de alvoko al la Skolt-Asocioj.

Estimataj Sinjoroj!

Dum la lasta somero okazis laŭ invito de Hungara Skolta Asocio kaj kun aprobo de Londona Internacia Skolta Konsilio internacia tendaro apud Budapeŝto aranĝita de nia Ligo kiun partoprenis skoltoj el 5 landoj. La celo estis montri ke post mallonga lernado per unu helpa lingvo la skolta kunlaboro, interkompreniĝo kaj la realigo de vera skolta solidareco kaj frateco estas atingebla. Tio sukcesis tiom, ke diversnaciaj estis en opaj rotoj de la tendaro kaj laŭ la raportoj poste aperintaj ili akiris neforgeseblajn rememorojn. Multaj el la knaboj lernis antaŭe nur kelkajn monatojn.

Pro tiu sukceso en kelkaj landoj, precipe nun en Hungarujo kie okazos la jamboreo en 1933 — multaj skoltoj, eĉ kelkloke tuta trupo — lernas Esperanton kaj korespondas per Esperanto kun alilandanoj. Tion mallonge menciis la raporto pri ko-

respondado okaze la badena skoltgvida konferenco. Nia Ligo uzas Esperanton jam inter membroj el 32 landoj.

Ni kuraĝas do proponi al vi, ke la skoltoj, kiuj preparas sin al la jamboreo en 1932 — almenaŭ tiuj, kiuj ne havas okazon bone lerni alian fremdlingvon — studu mem (kio estas eblá!) aŭ en kursoj Esperanton, ĉar, kiel ni eksciis el Hungarujo, tie granda parto de la jamboreanoj pretigas sin per Esperanto interkompreniĝi kun la alilandaj fratoj — jam simple pro la malbona ekonomia situacio, kiu ne permesas la elspezojn por la malfacile lerneblaj fremdlingvoj. Nia ligo volonte helpas tiun porskoltan laboron kaj certe kunhelpas la lokaj naciaj esperanto-societoj kaj instruistoj, se estos bezono. Laŭ la spertoj Esperanto estos lernebla dum monatoj kaj nia Ligo volonte helpas jam dum tiu tempo la ebligon de vasta interkorespondado inter la diversnacia skoltaro per Esperanto.

Imitinda estas la ekzemplo de la Hungara Skolta Asocio, kiu fondis konstantan premion por doni ĉiujare al tiu hungara skolta trupo, kiu montras plej bonan progreson en la studado de Esperanto. Alia simila premio estas por la plej sukcesa eksterlanda korespondado.

Ni esperas, ke vi okupos vin per nia estimplena propono: atentigi la skoltaron, ke ili lernu Esperanton apud la aliaj lingvoj, tiom pli, ĉar laŭ hungara sciigo la tiea jamboreo-policistaro devos scii grandparte la lingvon — apud aliaj fremdlingvoj — kaj oni projektas prezentadojn en Esperanto, ĝi do utile servos por skoltismo.

Samtempe ni sciigas vin, ke dum julio 1932 nia Ligo aran-

ĝas sian dekunan Internacian Tendaron apud Londono, al kiu ni skoltfrate invitas viajn membrojn kaj petas, ebligu, ke almenaŭ kelkaj el ili povu partopreni el tiuj, kiuj jam scias aŭ ĝis somero lernos Esperanton.

Ni tre ĝojas, se vi bonvolus sciigi nin, kiajn aranĝojn vi faris en tiu rilato kaj por helpi la aferon, eble sciigos pri tio per la Londona Internacia Skolta-Kontoro, por nia Ligo aŭ rekte la jamborean aranĝanton kaj ankaŭ la aliajn naciajn skoltasociojn.

Estimplene salutas skoltfrate
sincere via

(stampo)

Dudek-jara jubileo de la Pola Skoltaro.

En aŭgusto de k. j. Pola Skoltaro festis jubileon de ekzisto kies lulilo estas — Lwów. Jubileon oni festis per aranĝo de skolta tendaro en Brzuchowice apud Lwów, kie la unuaj polaj skoltoj t. e. en la jaro 1911 tendaris.

Ĉi tiun Jubileon ĉeestis krom ĉiuj Lvovaj geskoltoj, estintaj geskoltoj kaj simpatiantoj, ankaŭ estro de ĉefkomando Clbromski, la unua gvidanto de Lvovaj skoltoj Jankowski, pastro dr-o Gehard Szmyd, rek. prof. dr-o Niemczycki, dr. Poratyński kaj multajn salutleterojn oni alsendis je ĉi tiu tago nome de pastro episkopo Bandurski, ministro de publikaferoj gen. Norvid Neugebauer, prez. de vojevodio Silesia dr-o Grażyński kaj aliaj.

Post solena meso kaj sport-vetludoj, okazis revuo de skolttrupoj kaj disdono de memor-insignoj. Vespere oni tendaris ĉe granda fajrejo dum kio oni honorrememoris pri jam mortintaj pioniroj de Pola Skoltaro. Poste oni prelegis kaj kantis skoltajn kantojn.

Solenon oni finis per komuna kanto de skolta himno.

Mondjamboreo de tutmondaj riveraj skoltoj en Polujo.

Komisiono de Skolta Pola Ligo post preciza esploro de tereno por aranĝi Mondjamboreon de riveraj-skoltoj, decidis aranĝi ĝin venontan jaron t. e. en 1932 j. sur apudmara teritorio Kościerzyna sur la lago »Garzyńskie«.

Antaŭ Mondjamboreo de tutmondaj skoltoj okazos nacia jamboreo de polaj river-skoltoj. Ĝi okazos en aŭgusto 1932 j. kaj partoprenos ĝin skoltoj polaj kaj eksterlandaj.

Je ĉi tiu Jamboreo ĉeestos persone ĉefskolto tutmonda lordo Baden-Powell of Gillwell kun edzino. Kreinto de Skoltisma ideo Roberto Baden-Powell estis ordenita en la jaro 1929 per plej alta pola ordeno »Polonia Restituta«.

Ĉiuj artikoloj, koncernaj al Skolta Esperantista Ligo, esperantista movado en Polujo kaj eksterlande estu direktataj al Redakcio de „Juna Samideano“ (por Skolta Angulo) Kraków, Plac Matejki 4.

KRONIKO.

EDINBURGH. — Pastro G. Morgan faris paroladon en la radio-stacio de Edinburgh kaj Glasgow pri skolta esperantista tendaro okazinta en Budapeŝto.

GORLESTON. — S-ro M. Blake gvidas kurson por skoltoj.

HEYWOOD. — S-ro H. Shaw, prelegis antaŭ loka skoltaro en preparo Esperanto-kurso por skoltoj.

LIVERPOOL. — F-ino Baxter gvidas Esperanto-kurson por skoltoj.

Britujo.

LONDON. — Londona S. E. L. anaro havas pli ol 60 anojn. Do estas jam fakto, ke ankaŭ skoltinoj konstante pligrandigas aron de ge-SEL-membroj. Certe ĉi tiu nombro estas ne granda, tamen ni devas konstati, ke movado ĉe ili vigliĝis kaj de diversaj partoj de l'mondo ni ricevas sciigojn, ke skoltinaj trupoj enkondukas Esperanton en sian programon.

PAISLEY. — Kvin skoltaj trupoj lernas Esperanton.

Hungarlando.

SZEGED. — Okaze de festa vespero la reprezentanto de la Hungara Skolta Asocio solene transdonis al la estro de skolttrupo No. 552 la premion — silkan standardeton — de la Asocio por plej bona sukceso en la eksterlanda esperantlingva korespondado. En Szeged 7 trupoj anoncis la emon, lerni Esperanton.

DEBRECEN. — Preparante sin al la mondjamboreo de skoltoj, jam la dua trupo decidis lerni Esperanton.

BUDAPEST. — Prof. Mihalik komencis kurson en antaŭ-urbo por 40 skoltoj, en alia antaŭ-urbo lernas 20, en la cen-

tro anonciĝis 60. Okaze de publika skoltprezentado por la publiko rovero Andreo Szikszay kun granda sukceso prezentis hungarajn kantojn esperantlingve. En enkonduka parolado la distrikta skoltsekretario alvokis la gepatrojn, ke ili permesu la viziton de esp. kursoj al siaj infanoj. La organiza komitato de la mondskolttendaro decidis, ke angulo de la tendaro estos rezervita por esperantistoj. Por tendara policskoltaro oni akceptos en unua vico tiujn, kiuj jam scias Esperanton. Kompreneble oni esperas, ke ankaŭ alilande lernos la junularo la lingvon, por povi utiligi ĝin dum la mondkunveno skoltara.

Pollando.

BYDGOSZCZ. — Sekretario de Skolta Esperantista Ligo (Pollanda Distrikto) — sciigas ĉiujn geskoltojn scipovantaj Esperanton, ke ili aliĝu tuj, senhezite al supre citata adreso por pligrandigi vicojn de la S. E. L.-anoj. Ĉiu skolto-esperantisto rajtas porti sur maniko ĉemizinsignon kvinpintan „verdan stelon“ insignon de Esperantistoj por montri konon de helpa internacia lingvo.

Tia skolto nomiĝos Esperanto-tradukisto. Afero tiom pli grava ke en jaro 1933 en Hungarujo okazos internacia skolta Jamboreo. Do geskoltoj demandu pri informoj Sekretarion de S. E. L. Zbigniew Woźniewski, Bydgoszcz, ul. 20-go Stycznia 20 m. 1. Aligu poŝtmarkojn por respondo.

LWÓW. — Laste kreiĝis ĉe Lvova skolta komando, fako por hungaraj aferoj kaj jamboreo, kiun gvidas skolto Leopoldo Günsberg. Interalie estas lokita en monata pola gazeto „Skaut“ angulo de „Hungaraj sciigoj“. En ĝi estas sciigataj preparlaboroj por Internacia Skolta Jamboreo kaj estas lokita ĉio kio koncernas la hungaran skoltan movadon.

KRAKÓW. — Grava kaj aktuala okazo! Filmoj pri Budapeŝto (79 bildoj) estas prunteblaj ĉe pola SEL-agento Emil Mayer Kraków Lelewela 9. m. 2. Priskribo de Budapeŝto kaj aparte de ĉiu bildo estas kunsendataj al skoltaj rondoj, trupoj en ĉiu pola urbo. Okazo estas tiom pli valora ke en 1933 jaro okazos Internacia Jamboreo en Hungarujo. Do postulu tuj kondiĉojn.

Esperanto kiel interligilo inter tutmonda skoltaro.

Multaj skoltoj konas Esperanton, ne multaj tamen scias, ke ekzistas „Pola Distrikto de Internacia Skolta Esperantista Ligo“. Dum 23. Kongreso de Esperantistoj en Kraków, ĉe okazinta kunveno de skoltoj-esperantistoj, oni decidis, ke Polujo estu ekzemplo por aliaj landoj, ke ĝi estante lulilo de Esperanto kaj Esperantismo havu fortan esperanto-skoltan organizon. De la jaro 1918 ekzistas speciala „Skolta Esperantista Ligo“ kun sidejo en Anglujo. Ĝi posedas ĉirkaŭ mil anojn el ĉiuj landoj. Ĉu vi tamen scias kiom da skoltoj esperantistoj estas en Polujo? Ilia nombro estas entute 40. Tutpola skoltaro posedas preskaŭ 70-mil anojn, nombro de esperantistoj inter ili estas do guto en la maro. Tiom da niaj skoltoj posedas spertekzamenojn kiel tradukantoj el lingvoj angla, franca, germana kpt. Kaj ĉu estas inter ni tradukantoj esperantaj? Mi vin certigas, ke vi akiros multe pli grandajn profitojn el Esperanto, korespondante kun viaj kolegoj el aliaj landoj, vi povos multe da bonaj kaj utilaj novaĵoj ekscii kaj vi povos multe da interesaj aferoj komuniki al viaj eksterlandaj skoltfratoj, kiuj eble malmulte scias pri nia lando, kulturo, literaturo pola, pri niaj popol-moroj kaj pri nia skolta vivo. Malmultaj eble skoltoj estas informitaj pri tio, ke dank'al Esperanto la verko de Eliza Orzeszko „Marta“ estas tradukita en japanan lingvon kaj fariĝis deva lekturo en mez-lernejoj en la lando de „florantaj ĉerizoj“.

Nia revuo estas dediĉita speciale por junularo, ĝi enhavas skoltan fakon celantan per facila materialo en ĝi entenita, informi vin pri internacia skoltaj movado kaj vivo, doni al vi eblecon ekzerci lingvon internacian kaj plifaciligi al vi interligon de amikaj rilatoj kun makproksime de vi loĝantaj skoltfratoj.

Mi turnas min al ĉiuj niaj skoltoj-legantoj kun varma alvoko, ke vi diskonigu niajn celojn inter skoltoj ne esperantistoj, ke vi petu viajn skolttrupestrojn en grupoj al kiuj vi apartenas, ke ili fondu kursojn de Esperanto. Ĉiu el vi komencu jam nun labori kaj sendu al Redakcio de „Juna Samideano“ sciigojn pri ĉiu paŝo kaj pri progreso de via laboro. Instigu ĉiujn novajn skoltojn esperantistojn, ke ili sendu siajn nomojn al Sekretario de S. E. L. por nia Pola Distrikto kaj eĉ mem sendu iliajn nomojn kaj adresojn.

Sciigojn kaj demandojn direktu laŭ la adreso: Sekretarjato „Harcerskiej Ligi Esperanciej Oddział Polski“, Zbigniew Woźniewski, Bydgoszcz ul. 20. Stycznia 20, m. 1.

Pere de Esperanto ĉiuj skoltoj sur la tuta tergloba kuniĝos konsente siajn brakojn, ĉar plej grava disigilo — lingva malfacileco pere de Esperanto estas forigita.

Zbigniew Woźniewski
(Bydgoszcz).

Kristnaskaj kutimoj.

Kristnaska-soleno estas eble la plej agrabla nia festo. Ni revenas tiam al plej belaj momentoj de infanaĝo kaj juneco, al tiuj kiuj estas por ni proksimaj, en kies rondo ni iam bonvenigis stelon el Betleemo. Nenio do estas stranga, ke tradicioj de Kristnasko transiras ne ŝanĝitaj el generacio al generacio, ke ĝis hodiaŭ konserviĝis kutimoj kaj moroj el praaj tempoj.

Nia familia-vespera-soleno, komenciĝanta kun ekbrilo de la unua stelo, prezentadoj kaj kantoj de la knaboj ĉirkaŭirantaj domojn kun stelo kaj staletoj — ne estas sole ĉe ni konataj. La moroj, kutimoj kantoj kaj solenoj kristnaskaj ekzistas en la tuta mondo, ili diferencigas inter si iom, sed ĉie ili estas parencaj — en oriento kaj okcidento, en sudo kaj nordo.

Anglujo ekzemple, festas Kristnaskon tre solene. „Christmas“ estas por anglo ne nur festo religia sed ankaŭ nacia kaj hejma. Anglo, kie ajn li estus, ĉu ĉe poluso, ĉu ĉe ekvatoro, je eksono de preĝejoj sonoriloj ĉiam estas kortuŝita. En Anglujo same kiel en Polujo, malriĉaj infanoj iras de domo al domo kun lanternoj kaj kantoj, kaj ĉiu anglino opinias, ke estus peko, se ŝi ne donacus al la infanoj kelkajn monerojn, manĝon aŭ veston.

En Germanujo, movado sur stratoj ne estas en tiu tago tiel vigla kiel kutime. En hejmoj kristnaska vespero festata estas tre solene, kaj ne ekzistas hejmo kie ne estus „arbo“ „Christbaum“.

Francujo iom post iom forgesas pri malnovaj tradicioj, precine en grandaj urboj, tamen en vilaĝoj oni ankoraŭ konservis malnovajn kristnaskajn kutimojn.

En Italujo preskaŭ en ĉiu kapelo troviĝas kristlulilo ĉe kiu staras figuroj prezentantaj sanktajn Dipatrinon kaj Jozeŝon, poŝtistojn kaj reĝojn kiuj alportas donacojn al Dia Infano. Ĉe tiu Kristlulilo kolektiĝas infanoj vigle disputantaj kun okuloj pie fiksataj al tuta figuraro.

Hispanoj, elirinte el la preĝejo post „Paŝtista Meso“ bruligas fajrojn, pafas, kantas kaj dancas sur stratoj, kaj sian „Bonan nokton“ (Noche Buena) festas simile, kiel ĉe ni en Polujo per kunveno familia dum kiu oni manĝas tradiciajn

manĝaĵojn kaj post kiu oni kantas malnovajn kantojn je honoro de novnaskiĝinta Di'infaneto.

* * *

*Kristnaskaj vespero kaj nokto, ĉe pola vilaĝa popolo, estas plenaj je diversaj kredoj, mir'akontoj. Neklera popolo kredas, ke kion ajn oni faras dum tiu mirakla tempo de kristnaska nokto, tion oni farados dum tuta posta jaro. El multaj kredoj de pola vilaĝa popolo, ni citos ĉi tie nur plej gravajn, oni devas tamen menci, ke la kredoj kaj mir'akontoj de ni citataj estas kolektitaj el diversaj partoj de Polujo kaj ne ĉiuj el ili estas en tuta Polujo konataj.

En multaj partoj de nia lando regas konvinko, ke, se oni volas havi monon, oni devas dum la mirakla nokto lavi sin en akvo kaj en la saman akvon ĵeti moneron tiam la celo certe estos atingita. Aliloke oni asertas, ke en tiu tempo ne bone estas prunti ion de alia persono, oni ne povas levi objekton, kiun iu perdis, oni ne devas trinki akvon ĉar dum rikolto oni havos ne trankviligeblan soifon k. t. p.

Kelkaj kredas, ke tiu — kiu manĝis tiutempe la frukton, aspergitan per sankta akvo en tago de Sakta Mario — tiu povos eviti dum tuta jaro doloron de gorĝo, aŭ ke manĝado de nuksoj defendas kontraŭ dento-doloro.

Laŭ la popolaj kredoj, nombro de manĝaĵoj dum kristnaska vespermanĝo devas esti para, plej ofte 12. Oni kovras tablon per pajlo, kaj sub telerojn oni submetas oblaton. Se la oblato algluiĝos al la telero, tiam oni diras ke rikolto estos tiujare abunda.

En multaj vilaĝoj regas ĝenerala kredo, ke en la nokto de Kristnasko, ĉiuj bestoj interparolas inter si tiel kiel homo kun homo.

Ornamado de „kristnaska arbo“ estas kutimo plej ofte renkontata en urboj, sed en vilaĝoj oni povas nun tre ofte tiun kutimon observi. La arbo estas simbolo de l'vivo. — Ĉar vivo alportas fruktojn, tial ni vidas sur la arbo pendantajn pomojn, oranĝojn, nuksojn k. p. t.

Menciita kutimo regas preskaŭ en la tuta Europo kaj katolikaj misiistoj transportis ĝin al plej malproksimaj regionoj de Afriko, Australio kaj Azio.

ŜERCOJ.

ĈE HORLOGĜISTO.

Kliento: — Mi aĉetis ĉe vi horloĝon, kaj vi diris, ke ĝi funkcios dum tuta mia vivo, kaj jen ĝi plu ne iras.
 Horloĝisto: — Ha jes! Sed vi sinjoro aspektis tiam, tiel malbone.

KIAL?

Manjo: — Paĉjo, kial vi havas tiel grizajn harojn sur la kapo — dum via barbo estas tiel nigra?
 Patro: — Ĉar miaj haroj sur la kapo estas 20 jarojn pli aĝaj ol mia barbo.

ERARO.

Almozisto (kun pendanta sur brusto surskribo »Blindulo«): — Pardonu, sinjoro, vi donis al mi butonon anstataŭ monero.
 Sinjoro: — Kion vi diras? sur via tabuleto estas surskribo »Blindulo« kaj vi ja bone vidas.
 Almozisto: — Ha jes! Sed ĝi estas kulpo de mia edzino, ĉar ŝi pendigis sur mian bruston sian elpendaĵon anstataŭ la mian. — Mi estas surdmutulo.

NOVA MALSANO.

— Ĉu vi scias, ke nun ĝenerale regas nova malsano je okuloj kaj ĝi ĉiutage terure disvastiĝas.
 — Jes, kion vi diras? Kiaj simptomoj de ĉi tiu malsano estas?
 — La simptomoj estas jenaj, ke la homoj nenie povas vidi monon.

MUZIKEMO.

Suboficiro: — Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri muziko elpaŝu!
 — Elpaŝas ses soldatoj konataj inter kolegoj, kiel bonaj muzikistoj.
 Suboficiro: — Bonege! transportu pianon de sinjoro kapitano sur III-an etaĝon.

SANKTA NIKOLAO.

Jaĉjo: — Panjo, mi estas tre scivola kion mi ricevos de sankta Nikolao?
 Panjo: — Vi estas jam sufiĉe granda kaj mi devas ĉiri al vi la veron; sankta Nikolao efektive ne iradas sur tero, gepatroj nur rakontas pri li al malgrandaj infanoj.
 Jaĉjo: — Pli bone diru al mi, ke vi nenion volas aĉeti por mi

Korespondado.

Ni enpresas senpage la nomon de ĉiu nia abonanto, kiu deziras esperante korespondadi kun gesamideanoj tutmondaj.

- ANGLUJO S-ro J. Bateson 21., Barkway Road, Royston Herts, kun gesamideanoj de Polujo.
- ĈEĤOSLOVAKUJO Subtrupestro A. Macek, Trnava-Seminario kun skoltaj tutmondaj.
- FRANCUJO Francis Mace, policinspektoro, 104, rue Asselin, Cherbourg. (Unua temo-priskribu vian urbon).
- GERMANUJO F-ino Else Bursch (bei Heymann), Meisen, Markt 2.
- HISPANUJO Emanuelo Diaz, Lizia 25, Oviedo, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.
- JAPANUJO F-ino Acuto Ito, Kurokauamura, Imizugun, Tojamaken.
- NEDERLANDO S-ro Intruisto L. E. Mat ji Terneuzen, pri Esperanto kaj muziko kun junuloj 14—18 jaraj.
- POLLANDO Marjan Klimowicz, Lublin, ul. 1-go Maja 2. m. 33. studento, gvidanto de Studenta Rondo, deziras korespondi kun gvidantoj de similaj organizaĵoj en Polujo pri esp.-movado kaj historio. Kun eksterlandanoj precipe kun bohemiaj kaj anglaj, pri diversaj temoj.
- POLLANDO S-ro instruisto Jan Peńsko, Mińsk-Mazowiecki, Skrzyn, poczt. 48. deziras korespondi kun eksterlandanoj.
- POLLANDO S-ro Aleksander Zimmer, Kraków ul. Murowana 8. II. p. deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj kolektantoj.
- SVEDUJO S-ro Torsten Kartsson, Granstorp, Ingelstad, 17-jara.
- USONO F-ino Jennie Lehto, 545 Ingersoll Street, W., Marschfield (Oregon) 19-jara.



LEO TURNO.

KOMPLETNY PODRĘCZNIK JĘZ. ESPERANTO

Wydanie IV, zmienione 1932. — Cena egz. 1'25 zł.
 10 egz. 9'50 zł. — 20 egz. 18'50 zł. — 50 egz. 45 zł.

SŁOWNIK ESP.-POLSKI I POL.-ESPERANCKI

Cena egz. 1 zł. — 10 egz. 8 zł. — 20 egz. 15 zł.

CZYTANKI ESPERANCKIE — ANEKDOTARO.

Cena 1'50 zł. — 10 egz. 12 zł. — 20 egz. 23'50 zł.

Ceny rozumieją się przy zapłacie zgóry.

Adres wydawcy: Dr. Leopold Dreher Kraków, Starowiślna 37. — Konto P. K. O. 405.716.

En Administracio de J. S. estas aĉeteblaj:

Esperanto-lernolibroj 1'25 zł.
 Ŝlosiloj 0'90 „ + 15%
 „ malgrandaj . 0'50 „
 Poŝtkartoj kun verda sendkostoj
 stelo 100 egz. 1'50 „

Ni ankaŭ peras en vendado de diversaj esperantajoj.

W Administracji „Juna Samideano“ można nabyć:

Podręcz. do nauki jęz. Esperanto 1'25 zł.
 Klucze „ „ „ „ 90 „ + 15% na
 „ mniejsze „ „ „ 0 50 „ kosztą
 Kartki pocztowe z nadruk. ziel. przesyłki.
 gwiazdą za 100 sztuk 1'50 zł.

Również pośredn. przy nabywaniu różnych książek esp.

„JUNA SAMIDEANO“ Kraków, Plac Matejki 4. — Konto P. K. O. 412.308.